

Ercminado de Ems la vera historio

Emser Erzbergbau die wahre Geschichte



GEFA-jarkunveno en Bad Ems

La ekskurso klarigos al ni la evoluon de la loka
ercminado (vd. paĝon 5)

GEFA-Jahrestreffen in Bad Ems

Der Ausflug wird uns die Entwicklung des örtlichen
Erzbergbaus erklären (s. Seite 5)

Karaj gelegantoj	2	Liebe Leserinnen und Leser	2
Jubilanta stacidomo	3	Jubelndes Bahnhofsgebäude	3
Kompletbar kaj substitua bustrafiko	4	Vollsperrung und Schienenersatzverkehr	4
GEFA-jarkunveno en Bad Ems	5	GEFA-Jahrestreffen in Bad Ems	5
Ĉu eble?	7	Kann das?	7
Kursoj	8	Kurse	8
Servakompanistinoj	10	Alltagsbegleiterinnen	10
Kongreso en la filmkuliso	11	Kongress in der Filmkulisse	11
GEFA-anoncoj, redakcio	12	GEFA-Mitteilungen, Redaktion	12



Karaj gelegantoj,

bela penso: Mi okupiĝas pri mi mem, pri ĉio alia okupiĝas mia aŭtonoma AI¹-agento. Ĝi diras al la polvosuĉilo, kie ĝi purigu. Ĝi zorgas pri plenigita fridujo. Ĝi regulas mian impostdeklaron kaj pri-

zorgas la laboron, per kiu mi gajnas mian monon. Mi ja ne volas diri, ke tio estas nerealisma – ne konsiderante, ke mi probable ne plu havus laboron por gajni monon. Tamen kien ni venos, se ni delegas ne sole agadon kaj pensadon al la tekniko, sed ankaŭ la respondecon?

Ke mia komputilo, per kiu mi ĵus skribas tiun ĉi tekston, ne ĉiam faras tion, kion mi atendas de ĝi, estas fenomeno pri kiu mi kalkulas. Jam ĝiaj antaŭuloj okaze surprizis min per interesaj ideoj, kiel ekz., kompreni la aperon de certa litero skribante retmesaĝon kiel komision ĝin forsendi. Ne ĉiam devas esti la sistema kolapso kaj la „blua ekrano de la morto“. En ĉio, kion ni atendas de nia tekniko sidas la ĝermo de fiasko. Kial mi ne miras pri la ĵus legita informo, ke AI-programadagento ene de naŭ sekundoj nuligis la kompletan datumaron de evoluiga firmao kaj samtempe ĝian ekziston? Almenaŭ la AI poste pro la eraro petis pardonon.

„La eraro ĉiam sidas antaŭ la klavaro,“ la ĉarmaj kolegoj de la informteknologia sekcio regule ŝmiris sur nian buterpanon, se ni iam bezonis ilian helpon. Povas ja esti.

Sed nun ni hodiaŭ - en traktado kun la AI – estas en situacio, kie ni tutsimple ne plu povas kompreni, kial la rezulto de komision estas kiu ĝi estas – aŭ alie, kial ĝi ne estas tio, kion ni estas atendintaj. Ĉu la AI ie malĝuste devojiĝis aŭ ĉu ĝi min ne ĝuste komprenis? Ĉu ĝi min ne ĝuste komprenis, ĉar ĝi tro leĝere laboras aŭ ĉar mi ne klare esprimis min?

Liebe Leserinnen und Leser,

ein schöner Gedanke: Ich kümmere mich um mich selbst, um alles andere kümmert sich mein autonomer KI-Agent. Er sagt meinem Staubsauger, wo er putzen soll. Er sorgt für einen gefüllten Kühlschrank. Er regelt meine Steuererklärung und erledigt den Job, mit dem ich mein Geld verdiene.

Ich will ja nicht sagen, dass das unrealistisch ist – abgesehen davon, dass ich vermutlich keinen Job zum Geldverdienen mehr hätte.

Aber wohin kommen wir, wenn wir nicht allein das Tun und das Denken an die Technik delegieren, sondern auch noch die Verantwortung?

Dass mein Rechner, mit dem ich gerade diesen Text schreibe, nicht immer das macht, was ich von ihm erwarte, ist ein Phänomen, mit dem ich rechne. Schon seine Vorgänger haben mich gelegentlich mit interessanten Einfällen überrascht, wie z.B., das Vorkommen eines bestimmten Buchstabens beim Verfassen einer Email als Sendeauftrag zu verstehen. Es muss nicht immer der Systemabsturz und der „blaue Bildschirm des Todes“ sein. In allem, was wir von unserer Technik erwarten, steckt schon der Keim des Versagens. Warum wundert mich nicht die gerade gelesene Meldung, ein KI-Programmierungsentwickler habe innerhalb von neun Sekunden den gesamten Datenbestand einer Entwicklerfirma gelöscht und sie damit um ihre Existenz gebracht? Immerhin hat sich die KI anschließend für den Fehler entschuldigt.

„Der Fehler sitzt immer vor der Tastatur,“ hatten uns die netten Kollegen von der IT-Abteilung regelmäßig aufs Butterbrot geschmiert, wenn wir einmal ihre Hilfe brauchten. Mag ja sein.

Nun sind wir aber heute – im Umgang mit der KI - in einer Lage, wo wir schlicht nicht mehr nachvollziehen können, warum das Ergebnis eines Auftrags ist wie es ist - oder anders, warum es nicht das ist, was wir erwartet hatten. Ist die KI irgendwo falsch abgebogen, oder hat


¹) AI=Artefarita Intelektro

Ĉu mi lasu tian AI decidi por mi, sen ke mi povas fidi al la maljuna sorĉisto, kiu ja havas la ĝustan magian frazon en sia provizo, se la mizero estas granda?

Prof. Stuart Russell, informadikisto ĉe la Berkeley-Universitato formulis la lakonan frazon: „Vi ricevas ekzakte tion, pri kio vi petis, ne tion, kion vi volas.“

Eble kelkfoje tamen estas pli bone fari ĝin mem?

Salutas vin



Guido Brandenburg

sie mich nicht verstanden? Hat sie mich nicht verstanden, weil sie nachlässig arbeitet oder weil ich mich nicht klar ausgedrückt habe?

Kann ich eine solche KI für mich entscheiden lassen, ohne auf den alten Hexenmeister vertrauen zu können, der schon den richtigen Zauberspruch parat hat, wenn die Not groß ist?

Prof. Stuart Russell, Informatiker an der Berkeley Universität, hat den lakonischen Satz geprägt: „Sie bekommen genau das, worum Sie geben haben, nicht das, was Sie wollen.“

Vielleicht ist es machmal doch besser, es selbst zu machen?

Es grüßt euch

Guido Brandenburg

Jubilanta stacidomo



Nun fakte ne estas la stacidomo, kiu jubileas, sed la urbo Hamm entute, kiu festas la okcentan datrevenon de sia fondiĝo. La stacidomo mem ja nur dum iom pli ol cent jaroj akompanis ĝian historion. Vi konas la konstruistojn monumenton jam de FE 4/2024.

Sed kiel vi vidas sur la marko, ĝi estas elektita de la komisiita grafikistino Barbara Dimanski prezenti apud la Lübcke-muzeo, la Maxipark-elefanto, la muziklernejo kaj la malnova urbo-domo Hamm sur la poŝtmarko. La urbo ne estis reprezentita en la ĵurio, sed kompreneble helpis al la artistino trovi la ĝustajn motivojn

Guido Brandenburg


Jubelndes Bahnhofsgebäude

Nun ist es tatsächlich nicht das Bahnhofsgebäude, das Jubiläum feiert, sondern die Stadt Hamm insgesamt, die den achthundertsten Jahrestag ihrer Gründung begeht. Das Bahnhofsgebäude selbst hat ihre Geschichte ja nur etwas mehr als hundert Jahre begleitet. Ihr kennt das bauhistorische Denkmal ja schon aus dem FE 4/2024.

Wie Ihr aber auf der Marke seht, wurde es von der beauftragten Grafikerin Barbara Dimanski ausgewählt, neben dem Lübcke-Museum, dem Maxipark-Elefanten, der Musikschule und dem alten Rathaus, Hamm auf der Briefmarke vorzustellen. Die Stadt war nicht in der Jury vertreten, hat aber der Künstlerin geholfen, die richtigen Motive zu finden.



(trad. Brandenburg)



Skemo / Schema: Mediathek Deutsche Bahn

Kompletbaro kaj substitua bustrafiko

Certe: La portempe kompleta funkcia ĉesigo kaj kumulado de konstruprojektoj estas pli efika ol konstruado „sub la ruliĝanta rado“, kiel ni tion kutimis pasinte – precipe se temas pri tiel multaj sekcioj, kie tio necesas.

Dum kompleta baro nun estis resanigata la linio Hamburg-Berlin. Novigendaj estis pli ol 165 km da trako kaj preskaŭ 250 trakforkoj, ŝanĝenda la surkonstruaĵo en la sekcio inter Wittenberge kaj Dergenthin. Oni instalas ses novajn trakinterligajn disforkejojn kaj ses regejojn, 19 pliaj estis modernigataj.

Ke tamen ankaŭ per tiu procedo la respekto de konstrutempoj ne estas garantiata, montris tiu projekto. Tie kulpis la longdaŭra frosto. La kompleta refunkciigo nun estas ŝanĝlokita de la 30-a de Aprilo al mateno de la 15-a de Junio. Tiam la dura tempo por la navedantoj trafitaĵ de la substitua bustrafiko provizore finiĝis.

Sed la prokrasto influas alian konstruejon iom malpli grandan.

En antcipio de granda koridora resanigo planita por 2029 inter Hamburg kaj Hannover estu

Vollsperrung und Schienenersatzverkehr

Sicherlich: Die zeitweilig vollständige Betriebs-einstellung und Kumulierung von Baumaßnahmen ist effizienter, als „unter dem rollenden Rad“ zu bauen, wie wir es früher gewohnt waren – gerade, wenn es um derart viele Abschnitte geht, die es nötig haben.

Unter vollständiger Sperrung wurde nun die Strecke Hamburg-Berlin saniert. Zu erneuern waren mehr als 165 Kilometer Gleise und fast 250 Weichen und auf dem Abschnitt zwischen Wittenberge und Dergenthin der Oberbau zu ersetzen. Sechs neue Überleitstellen wurden eingerichtet, sechs Stellwerke neu errichtet und 19 weitere modernisiert.

Dass aber auch mit diesem Verfahren die Einhaltung der Bauzeiten nicht garantiert ist, hat uns dieses Projekt gezeigt. Dort lag es am unerwartet langanhaltenden Frost.

Die vollständige Wiederaufnahme des Betriebs ist nun vom 30. April auf den Morgen des 15. Juni verlegt. Damit ist die harte Zeit für die vom Schienenersatzverkehr betroffenen Pendler vorerst beendet.

same sub kompleta baro 66 km da trako, 36 trakforkoj, partoj de la katenario kaj kelkaj pontoj.

Tiu konstruejo koncernas ankaŭ la sektion Lüneburg-Uelzen, kio tamen pro la unue menciita konstruejo ankoraŭ estas bezonata kiel ĉirkaŭvojo. Ĉu tio nun kondukas al Domino-efiko kun postsekvaj por aliaj konstruejoj, ankoraŭ vidiĝos.

La resanigo de la fervoja infrastrukturo estas ŝnurdanco, dum kiu intervenoj en unu loko ofte efikas al la kompleta reto.

La nodo Köln Hbf, Köln Deutz estas aparte neŭralgia punkto. La ĉesigita funkciigo de la elektronika reĝejo estas nun ŝovita al 2027.



Allerdings hat die Verzögerung Auswirkungen auf eine andere Baustelle etwas kleineren Ausmaßes.

Im Vorgriff auf eine für 2029 geplante große Korridor-Sanierung sollten zwischen Hamburg und Hannover vom 01. Mai an ebenfalls unter Vollsperrung 66 km Gleis 36 Weichen, Teile der Oberleitung und einige Brücken erneuert werden.

Diese Baustelle betrifft auch den Abschnitt Lüneburg–Uelzen, der jedoch wegen der erstgenannten Sperrung noch als Umleitstrecke gebraucht wird. Ob dies nun zu einem Domino-Effekt mit Auswirkung auf andere Baustellen führt, wird sich herausstellen.

Die Sanierung des Eisenbahn-Infrastruktur ist ein Drahtseilakt, bei dem Eingriffe an einer Stelle sich oft auf das gesamte Netz auswirken. Der Knoten Köln Hbf, Köln Deutz ist ein besonders neuralgischer Punkt. Die abgebrochene Inbetriebnahme des elektronischen Stellwerks ist jetzt auf 2027 verlegt.

Guido Brandenburg

(trad. Brandenburg)

GEFA-jarkunveno en Bad Ems

09.-11.10.2026



Haus Lindenbach

(Foto: Stiftungsfamilie BSW & EWH)

La BSW-hotelo Haus Lindenbach situas en Germanio kompare centre kaj estas bone atingebla per fervojo. Tiu estas la ĉefa organiza kaŭzo por inviti vin al tiu loko. La aliaj kaŭzoj – ĉarma regiono en la Lahn-valo enmeze de la naturparko Nassau, historiĉa grundo setlata jam de ferepokoj, keltoj, romianoj, ĝerma-

GEFA-Jahrestreffen in Bad Ems

09.-11.10.2026

Das BSW-Hotel Haus Lindenbach liegt in Deutschland vergleichsweise zentral und ist gut mit der Bahn erreichbar. Das ist hauptsächlich der organisatorische Grund, Euch an diesen Ort einzuladen. Die anderen Gründe – eine reizende Gegend im Lahntal inmitten des Naturparks Nassau, ein geschichtsträchtiger



La ĝusta haltejo: Bad Ems West;
Der richtige Halt: Bad Ems West

noj, vizitata de poetoj kaj cezaroj – substrekas, ke ĝi estas loko konvena por gastigi ankaŭ nin fervojajn esperantistojn.

Ni preparos programon interesan certe same por fervojistoj kaj nefervojistoj, kun anekdotoj kaj bildoj de la ĉi-jara IFEF-kongreso apud la malseka monto (Mokra Gora), prelegetoj kun novaĵoj el la fervoja mondo kaj kun distra vespero.



Fervojon la mineja muzeo kompreneble ankaŭ havas.

Eine Bahn hat das Bergbaumuseum selbstverständlich auch.

(Foto: Emser Bergbaumuseum)

Ekskurso kondukos nin en la historion de la regiona ercminado. La elfosataj kaj fandataj ercoj de plumbo, zinko kaj arĝento kreis la fundamenton por la financa bonstato de la urbeto, sed estis en malagrabla konkuro kun la klinikoj dependaj de pura aero kaj pura akvo el la mineralaj fontoj. Mi ne volas malkaŝi, kiu finfine venkis la batalon.

Disponeblaj en la hotelo estas unutilaj kaj dutilaj ĉambroj. La fakturo de la domo inkludas maten- kaj vespermanĝon.

Boden, besiedelt schon von Eisenzeitlern, Kelten, Römern, Germanen, besucht von Dichtern und Cäsaren – unterstreichen, dass es ein passender Ort ist, auch uns Eisenbahner-Esperantisten zu beherbergen.

Wir werden ein Programm vorbereiten, das sicherlich für Eisenbahner und Nichteisenbahner gleichermaßen interessant sein wird, mit Dönekens und Bildern vom diesjährigen IFEF-Kongress am nassen Berg (Mokra Gora), Kurzvorträgen mit Neuigkeiten aus der Welt der Eisenbahn und mit einem unterhaltsamen Abend.

Ein Ausflug wird uns in die Geschichte des regionalen Erzbergbaus führen. Die gefördert und verhütteten Blei-, Zink- und Silbererze legten den Grundstein für den finanziellen Wohlstand des Städtchens, waren aber unangenehme Konkurrenten der Heilstätten, die von sauberer Luft und sauberem Wasser aus den Mineralbrunnen abhingen. Ich will nicht verraten, wer letztlich den Kampf gewonnen hat.

Im Hotel sind Einbett- und Zweibettzimmer verfügbar. Die Rechnung des Hauses schließt Frühstück und Abendessen ein.

Der Preis für ein Einbettzimmer und zwei Übernachtungen ist **180 €**, der für ein Zweibettzimmer und zwei Übernachtungen **264 €**.

Am Ort werden wir um einen bescheidenen Beitrag von 20 € je Person zur Finanzierung des Programms bitten.



La salatbufedo / das Salatbuffet
(Foto: Stiftungsfamilie BSW & EWH)

La prezo por unulita ĉambro kaj du tranoktoj estas **180 €**, tiu por dulita ĉambro kaj du tranoktoj **264 €**

Por financi la programon ni surloke petos pri modesta kontribuo de 20 € po persono.

Bonvolu aliĝi per neformala informo pri via deziro je unulita/dulita ĉambro, via nomo kaj kaze de dulita ĉambro tiu de la kunloĝanto.

Sendu ĝin letere al:

Fervoja Esperantisto
Görlitzer StraÙe 17
DE-48317 Drensteinfurt

aŭ retmesaĝe al:

fervoja.esperantisto@t-online.de

Kaj bonvolu ĝiri la ĉambro-kotizon al la konto:

Andreas Diemel GEFA

IBAN: DE16 5009 0500 0000 9537 29

BIC: GENODEF1S12

La limdato estas 12.07.2026

Guido Brandenburg

Meldet Euch bitte mit einer formlosen Information über Deinen Wunsch nach einem Einbett-/Zweibettzimmer, Deinem Namen und im Fall des Zweibettzimmers dem des Mitbewohners an.



Sendet sie brieflich an:

Fervoja Esperantisto
Görlitzer StraÙe 17
DE-48317 Drensteinfurt

oder elektronisch an

fervoja.esperantisto@t-online.de

Und überweise bitte den Zimmerpreis auf das Konto:

Andreas Diemel GEFA

IBAN: DE16 5009 0500 0000 9537 29

BIC: GENODEF1S12

Anmeldeschluss ist 12.07.2026

(trad. Brandenburg)

Ĉu eble?



Italo-motorvagonaro en Milano;
ein Italo-Triebzug in Milano
(Foto: Sergio D'Afflitto, WikiMedia)

En la regiona trafiko germanaj trakoj ja aspektas sufiĉe multkoloraj. Tie interpuŝiĝas intertempe ĉ. 120 fervojtrafikaj entreprenoj en la troŝargita reto. La longdistanca reltrafiko estas, ne konsiderante unuopajn Flix-Train-

Kann das?

Im Regionalverkehr sieht es auf deutschen Gleisen ja ziemlich bunt aus. Hier drängen sich mittlerweile ca. 120 Eisenbahnverkehrsunternehmen auf dem überlasteten Netz. Der Schienenfernverkehr ist, von den vereinzelt FlixTrain-Einlagen, etwas Eurostar und der ÖBB abgesehen, eigentlich fest in der Hand der DB. Ein potenzieller Konkurrent aus Italien lässt da schon aufforchen, insbesondere, wenn er nicht mit aufgearbeiteten Reisezugwagen und geleasten Lokomotiven im IC-Segment, sondern mit Hochgeschwindigkeitstriebzügen auf den ICE-Stammstrecken verkehren will. 30 Siemens Velaro Triebzüge sollen einerseits München mit Berlin und Hamburg, andererseits München mit Köln und Dortmund verbinden.

Der 2006 gegründete Betreiber Italo S.p.A. ist seit 2012 auf italienischen Strecken unterwegs. Ziel sollte sein, die Preise zu drücken und den

aldonojn, iom da Eurostar kaj ÖBB firme en la mano de DB. Ebla konkuranto el Italio tial vekas atenton, speciale se li volas trafiki ne per modernigitaj pasaĝervagonoj kaj aĉetlujtaj lokomotivoj en la IC-segmento, sed per grandrapidaj motorvagonaroj sur la regulaj ICE-linioj. 30 Siemens Velaro motorvagonaroj interligu unuflanke München kun Berlin kaj Hamburg, aliflanke München kun Köln kaj Dortmund.

La ekspluatanto Italo S.p.A. fondita 2006 survojas depost 2012 sur italaj linioj. Celo estis mallevi la prezojn kaj plibonigi la servon, laŭ propra indiko tute sukcese. Nun la sama modelo estu aplikata en Germanio. Ĉu tio funkcios, dependas tamen ne de la konkurantoj, sed pli de la progreso en riparo kaj vastigo de la trakreto. Tiel longe kiel oni tie konstruas kaj la itineroj devas esti kondukataj tra konstruejoj kaj sur ĉirkaŭvojoj, plia ofertanto, kiu devas puŝiĝi tra la kudriltruoj, ne kontribuas al plibonigo de la vojaĝkvalito. Estus la kontraŭo.

DB mem komentas la planojn pozitive:

„Konkurenco inter fervojtrafikaj entreprenoj vigligas la negocon. De aldonaj veturoj sur la trako profitas ne nur niaj geklientoj, sed ankaŭ la medio!“



Service zu verbessern, nach eigenem Bekunden recht erfolgreich. Nun soll das gleiche Modell auch in Deutschland greifen. Ob das gelingt, hängt jedoch nicht von den Konkurrenten ab, sondern eher von den Fortschritten bei der Reparatur und dem Ausbau des Gleisnetzes. Solange dort gebaut wird und die Laufwege durch Baustellen oder über Umwege geführt werden müssen, trägt ein weiterer Anbieter, der sich durch die Nadelöhre zwingt, nicht zur Verbesserung der Reisequalität bei. Das Gegenteil wäre der Fall.

Die DB selbst kommentiert die Pläne positiv:

„Wettbewerb unter Eisenbahnverkehrsunternehmen belebt das Geschäft. Von zusätzlichen Fahrten auf der Schiene profitieren nicht nur unsere Kundinnen und Kunden, sondern auch die Umwelt“



Velaro motorvagonaro – Velaro Triebzug
(Foto: Wiki05, WikiMedia)

Guido Brandenburg

(trad. Brandenburg)

Kursoj

Ĉu vi estas malkontenta pri via lingvokono? Ĉu vi havas motivan krizon? Ĉu vi vane serĉas respondojn al lingvaj demandoj? Ĉu mankas al vi konversaciaj partneroj?

Jen ni havas du tute diversajn proponojn:

a) Aliĝu al enkonduka kurso en interreta babilejo:

Mardon, la 2-an de Junio 2026 unuafoje renkontiĝos en la Zoom-babilejo nova rondo de la

Kurse

Bist du unzufrieden mit deinen Sprachkenntnissen? Hast du eine Motivationskrise? Suchst du erfolglos nach Antworten auf sprachliche Fragen? Fehlen dir Gesprächspartner?

Da haben wir zwei völlig unterschiedliche Vorschläge:

a) Melde dich an einem Einführungskurs im Internet-Chatroom an:

Am Dienstag, dem 2. Juni 2026 trifft sich

konversacia kurso, kiun gvidas Dr. Rudolf Fischer, aŭtoro de la lernolibro „Esperanto im Gespräch“.



Pasintajn kursrondojn regule partoprenis vigla rondo kaj progresis (spite aŭ pro multe da amuzo dume) ĝis la nivelo B1 laŭ la eŭropa referenca kadro.

Por aliĝo kontaktu:

muenster@esperanto.de

b) Aliĝu al semajnfina intensa kurso en kaste-lo Oberwerries:

Venu de la 23-a ĝis la-25-a de Oktobro 2026 en eksterordinaran ĉirkaŭaĵon, progresigu vin kaj ĝuu distrajn horojn inter geamikoj kun samaj intereso.

La kurso komenciĝas vendredon vespere kun leĝera interkonatiĝa rondo kaj finiĝas diman-ĉon tagmeze. Loĝigo (kun aliaj Esperanto-pa-rolantoj) kaj manĝoj okazos surloke. Ekzistos grupoj por komencintoj kaj progresintoj.

La tuto kostos 164 €, por membroj de Germa-na Esperanto-Asocio 114 € danke al subvencio de la organizo.

Por aliĝo kontaktu:

andreas.diemel@esperanto.de

(telefono: 0800-3363636-5114)

Aŭ uzu formularon sur la retpaĝo

<https://www.esperanto.de/eo/revelo-sprachkurs-anmeldung>

Guido Brandenburg

erstmalig im Zoom-Chatroom eine neue Runde des Konversationskurses, den Dr. Rudolf Fischer führt, der Autor des Lehrbuchs „Esperanto im Gespräch“.

An früheren Kursrunden nahm regelmäßig eine muntere Runde teil und kam (trotz oder wegen viel Spaß dabei) bis zum Level B1 nach dem Europäischen Referenzrahmen.

Zur Anmeldung wendet euch an:

muenster@esperanto.de



b) Melde dich an einem Wochend-Intensivkurs im Schloss Oberwerries an:

Komm vom 23. bis 25. Oktober in eine außer-gewöhnliche Umgebung, bringe dich weiter und genieße unterhaltsame Stunden unter Freunden mit gleichen Interessen.

Der Kurs beginnt am Freitag mit einem lockeren Kennenlernabend und endet am Sonntag-mittag. Unterkunft (mit anderen Esperanto-Sprechern) und Essen gibt es vor Ort. Es wird Gruppen für Eingestiegene und Fortgeschritte-ne geben.

Das Ganze wird 164 € kosten, für Mitglieder des Deutschen Esperanto-Bunds 114 € dank einer Unterstützung der Organisationen.

Zur Anmeldung wendet euch an:

andreas.diemel@esperanto.de

(Telefon: 0800-3363636-5114)

Oder nutzt das Formular auf der Internetseite

<https://www.esperanto.de/eo/revelo-sprachkurs-anmeldung>

(trad. Brandenburg)

Servakompanistinoj

Ja estas impona provizo de avinoj,
sed kriza amaso de helpulinoj
En la sekcio de akompanistinoj.
Kaj po unu trilfajlon por la senleĝa spaco.
Jesja!!!
Plejbone sukcesi ĝustatempe esti antaŭ la tv!
Plenmalvigle ĉe tablo 60...

Sed ankaŭ la rilatoj inter mallumo kaj
ŝtonepoko
estas pli evidentaj ol oni kredas unuavide.
La junulinoj ĉiam havu ĉe si 1 aŭ 2 individue
almezuritajn,
manotaŭgajn kaj facile ĉeorteblajn
pavimŝtonojn
(hodiaŭ eble ankaŭ ĉi ŝriktrilfajlon a.s.)

Estas ja la konstato de kelkaj evolupsikologoj,
ke ni ĉiuj surteriĝis
per la malnovŝtonepoka pensaparato
por lozaj ŝtonoj.
La moduloj de la homa spirito
ĉiam adiciigas al detruemo...
Pro tio vi povas neglekti ĉiun utopion!
Ne parolante pri „Malkovru delican
mallumon!“

Jen la kompreno:
Mallumo estas pli ol neĉeesto de lumo!
Ĝi estas ankaŭ la ĉeestado de troveblaj
ŝtonoj,
kiujn ĵeti povas eklerni la junulinoj
ĉe ĉiu grado de mallumo...
Kelkaj regione establitaj ĵurnaloj
eĉ ofertas kursojn pri tio...



IVE & IZE – SCII LAŬ KIE IRI; 172;
Nula Horo – Transkultura Artkoncepto;
Kassel-Harleshausen 2026

Alltagsbegleiterinnen

Es gibt ja einen beeindruckenden Vorrat an
Großmüttern,
aber eine kritische Menge von Helferinnen im
Bereich der Begleiterinnen.
Und jeweils eine Trillerpfeife für den
rechtsfreien Raum
Jawohl!!!
Am besten, es rechtzeitig vor das TV zu
schaffen!
Vollträge am Tisch 60...

Aber auch die Beziehungen zwischen
Dunkelheit und Steinzeit sind offensichtlicher,
als man auf den ersten Blick glaubt.
Die jungen Frauen sollten immer 1 oder 2
individuell vermessene,
handliche und leicht mitzuführende
Pflastersteine bei sich haben
(heute vielleicht auch diese Abschreck-
Trillerpfeifen o.ä.)

Es ist ja die Feststellung einiger
Entwicklungspsychologen,
dass wir alle auf die Welt gekommen sind
mit einem altsteinzeitlichen Denkapparat
für lose Steine.

Die Module des menschlichen Geistes
addieren sich immer zu Zerstörungswut...
Darum kannst du jede Utopie vernachlässigen!
Um nicht zu reden von: „Entdecke köstliche
Dunkelheit!“

Hier die Erkenntnis:
Dunkelheit ist mehr als das Fehlen von Licht!
Sie ist auch die Anwesenheit auffindbarer
Steine,
die zu werfen die jungen Frauen bei jedem
Grad der Dunkelheit erlernen können...
Einige in der Region vertretene
Tageszeitungen bieten sogar Kurse dafür an...



(trad. Brandenburg)



Golubići - Stacio en nenio / Golubići – ein Bahnhof im Nichts
(Foto: Herbert Ortner, WikiMedia)

Kongreso en la filmkuliso

Baldaŭ la fervojaj esperantistoj volas renkontiĝi en Serbio dum sia 77-a internacia kongreso – unue en la ĉefurbo Beograd, tiam preskaŭ 250 km pli sudokcidente en subĉiela muzeo plukonstruita kiel filmkuliso. De la iam por interligo de Beograd kun Sarajevo kaj Dubrovnik uzata unutraka linio kun 760mm-ŝpuro restis malgranda sed impona parto, la „Ŝarganska osmica“, la „Ŝargana Ok“. Ĝi estas konstruaĵo por transiro de montpasejo. Sur aerlinia distanco de tri kilometroj estis venkenda altodiferenco de 240m. Hodiaŭ ĝi estas atrakcio por turistoj – kaj daŭrancele uzata filmkuliso.

La produktisto kaj reĝisoro Emir Kusturica tie en la serba-bosna limregiono lokis sian filmon „La vivo estas miraklo“, tragikomedio pri vilaĝa obstineco, privata fiasko kaj sortoj en la balkana milito. Multo historia por la registrado estis riparata kaj beligata, multo ankaŭ stilkonforme novkonstruita, kiel la stacio

Kongress in der Filmkulisse


Bald wollen sich die Eisenbahner-Esperantisten in Serbien zu ihrem 77. internationalen Kongress treffen – erst in der Hauptstadt Beograd, dann fast 250 km weiter südwestlich in einem als Filmkulisse ausgebauten Freilichtmuseum.



Von der einst als Verbindung von Beograd mit Sarajevo und Dubrovnik betriebenen eingleisigen Strecke mit 760mm-Spur ist ein kleiner aber spektakulärer Teil übriggeblieben,

„Golubići“, kiu situas meze en arbaro kaj simple nur belaspektas.
IFEF-kongreso apud tia linio kaj en tia ĉirkaŭaĵo ja estas rava imago. Ni raportos.

ШАРГАНСКА ОСМИЦА, географска карта



La tordita vojo tra la ŝarganaj montoj
Der verschlungene Weg durch die Sarganer Berge
(Skizo/Skizze: Ivan25, WikiMedia)

die „Šarganska osmica“, die Sarganer Acht. Sie ist eine Konstruktion zur Überquerung einer Passhöhe. Auf einer Entfernung von drei Kilometern Luftlinie war dort eine Höhendifferenz von 240m zu überwinden. Heute ist sie eine Attraktion für Touristen – und eine nachhaltig genutzte Filmkulisse.

Der Produzent und Regisseur Emir Kusturica hat dort im serbisch-bosnischen Grenzbereich seinen Film „Das Leben ist ein Wunder“ angesiedelt, eine Tragikomödie von dörflicher Sturheit, privatem Scheitern und Schicksalen im Balkankrieg. Vieles Historische wurde für die Aufnahmen repariert und verschönert, vieles aber auch stilsicher neu gebaut, wie der Bahnhof „Golubići“, der mitten im Wald liegt und einfach nur schön aussieht.

Ein IFEF-Kongress an einer solchen Strecke und in einer solchen Umgebung ist schon eine reizvolle Vorstellung. Wir werden berichten.



Guido Brandenburg

(trad. Brandenburg)

Redaktofino por FE 03/2026 estos la 15.08.2026		Redaktionschluss für FE 03/2026 ist der 15.08.2026	
Eldono:	Stiftung Bahn-Sozialwerk Zentrale Frankfurt/M.	Herausgabe:	Stiftung Bahn-Sozialwerk Zentrale Frankfurt/M.
Redakcio:	Guido Brandenburg	Redaktion:	Guido Brandenburg
Adreso:	Görlitzer Straße 17 48317 Drensteinfurt	Adresse:	Görlitzer Straße 17 48317 Drensteinfurt
Telefono:	02508-9107	Telefon:	02508-9107
Retpoŝto:	fervoja.esperantisto@t-online.de	E-Mail:	fervoja.esperantisto@t-online.de
Kotizkonto:		Beitragskonto:	
Nomo	BSW Esperanto Essen	Name	BSW Esperanto Essen
IBAN:	DE44 3606 0591 0000 5045 63	IBAN:	DE44 3606 0591 0000 5045 63
BIC:	GENODE1SPE	BIC:	GENODE1SPE
Donacoj estas bonvenaj sur konto:		Spenden sind willkommen auf dem Konto:	
Nomo	Andreas Diemel GEFA	Name	Andreas Diemel GEFA
IBAN:	DE16 5009 0500 0000 9537 29	IBAN:	DE16 5009 0500 0000 9537 29
BIC:	GENODEF1S12	BIC:	GENODEF1S12